

# PENSEO

N-ro 224

junio. / 2010

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 21-a jaro <http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm>

## Josip Pleadin (Kroatujo)



### Madono Mia

Madono mia, vi sanktaĵo de mia eklezio,  
pasinto, nuno kaj estonto mia imagita,  
krom vi ekzistas en mia viv' nenio,  
pro pekoj ĉu estos mi punita aŭ indulgita?

Vi soras en alto, neatingebla kaj magia  
sed kredas mi pri la ebleco atingi vin.  
Por veni al vi mi restos eterne kredanta kaj pia  
kaj sobre sub viajn piedojn mi metos min.

Se foje Damokla glavo forhakos mian kolon  
kaj pekoj niaj inferteatraĵon faros al ni  
mi daŭre ludos la saman danĝeran rolon  
sed lasos vin insule de nia harmoni'.

Kaj tie vi sidos ĉe muzo de verkoarto  
kaj ŝian baskon vi tiros kaj petos pri konsil'  
kiam venos el Parizo mia poŝta karto  
skribita per majstra inko en la konata stil'.

La muzo embarase sidos kaj cerbumos  
nekapabla respondi al via tikla tem'.  
"Al Eratoa kolegino vi iru!" - ŝi zumos,  
"ŝi nepre helpos al vi en via kordilem'".

Kaj tiam lasos vi la sentojn flirti kaj kurludi  
tra la insulo verda kaj magia en Nenielando,  
kaj vi lasos vian korpon senvesti kaj nudi,  
amori kaj ĝui sur senhoma sabla strando.



## Mikaelo Bronsxtejn (Rusujo)



### Al la virinoj

Amante vante, kun naivo,  
Ni ĝuas vin dum nia vivo...  
La vivolibron indeksante  
Post retiriĝo de l' naiv',  
Por tagoj dolĉaj kaj amaraj  
Mi danku vin, ho miaj karaj,  
Kaj mi konfesu, vin kisante,  
Ke estas ĝuste vi – la viv'.

## Imre Szabó (Hungarujo)



### Lumina

Brilu tra larmoj la suno  
brilu tra suno la larmoj  
kara fratino senpatrino  
kapreolokula kapreolkora  
vidu per larmoj se ne per suno  
se ne per suno vidu per la sino

Arboj kreskas per la larmoj  
arboj kreskas per la suno  
ankaŭ via arbo kreskos  
antaŭ via sojlo kie vi sidas  
sunovene sunoیره  
kreskos arbo alta arbo  
kun ventoj parolanta  
mesaĝojn susuranta  
millange milfolie  
pri la larmoj ilin kreskigantaj  
kaj la ventoj sin alligas  
por esti novaj branĉoj

kaj via ventobranĉara arbo  
 etendos sian savan tendon  
 sian verdan savon  
 super la mondo  
 super la suferoj super la plorantoj  
 super la luliloj el sia karno  
 super la ĉerkoj el sia karno

Brilu tra larmoj la suno  
 brilu tra suno la larmoj  
 kara fratino senpatrina

## Cezar (Germanujo)



**Al Penseo**

Dankon kun dec'  
 pro l' afablec'.  
 Kaj tiel plu  
 en tempa flu'.

Pense', jen stel',  
 artista lok'  
 kun verda bel',  
 instig' kaj vok'.

**Ho belulin'**

(partizana kanto)



tradukis **Andrea Fontana**

**(Italujo)**

Matenon tristan  
 mi elvekiĝis  
 ho belulin' mi ne plu povos kisi vin  
 matenon tristan  
 mi elvekiĝis  
 kaj min trafis l' invadint'

Ho partizano  
 min portu fore  
 ho belulin' mi ne plu povos kisi vin  
 ho partizano  
 min portu fore

ĉar proksimas jam la mort'

Kaj se mi mortos  
 partizanante  
 ho belulin' mi ne plu povos kisi vin  
 kaj se mi mortos  
 partizanante  
 entombigen igu min

Min entombigu  
 sur la montaro  
 ho belulin' mi ne plu povos kisi vin  
 min entombigu  
 sur la montaro  
 sube de ombranta flor'

Kaj ĉiuj homoj  
 preterpasantaj  
 ho belulin' mi ne plu povos kisi vin  
 kaj ĉiuj homoj  
 preterpasantaj  
 diros: "Ho! Tre bela flor'!"

La flor' ĝi estas  
 de l' partizano  
 ho belulin' mi ne plu povos kisi vin  
 la flor' ĝi estas  
 de l' partizano  
 mortintul' por la liber'...

## Mike59 (Michel Dereyger)



**(Francio)** tradukis

## Tristas ja Veneci'

Tristas ja Veneci'  
 Nia mortinta am'  
 Tristas ja Veneci'  
 Ni ne amas nin jam.

La vortojn serĉas ni  
 Sed enu' forprenas  
 Ni dezirus plori

Tamen jam ne povas.

Tristas ja Veneci'  
Kiam barkaroloj  
Povas nur emfazi  
Silenton sen larmoj.

Kaj sin premas la kor'  
Vidante gondolojn  
De amsopira par'  
Ŝirmi feliĉecon.

Tristas ja Veneci'  
Nia mortinta am'  
Tristas ja Veneci'  
Ni jam ne amas nin.

Muzeo aŭ preĝej'  
La vanaj belaĵoj  
Alloga enirej'  
Al tristaj okuloj.

Tristas ja Veneci'  
Vesper' sur la lagun'  
Kiam manon serĉi  
Neeblas ekde nun.

Ni provas ironi  
Vagante sub lunlum'  
Ekprovas forgesi  
Ĉiujn vortojn de am'.

Adiaŭ kolomboj  
Kiu eskortis nin  
Kun perditaj revoj  
Adiaŭ Suspirpont'.

Tristas tro Veneci'  
Nia mortinta am'  
Tristas tro Veneci'  
Ni ne amas nin jam.



## Anna Karlik (Hungarujo)



### Mi pensas pri vi

Matene ekregis min  
—veture per Metroo—  
tiu tristiga sento,  
ke mi por vi estas jam  
ne pli ol nur memoro.

Mia karega Princo!  
Kiel revenis vintro,  
vi jam ne amas min tro,  
jen, malvarmiĝis al mi  
eble, fine via koro...

### Peta preĝo

(Ne nur) por miaj geamikoj

Nia Patro, donu al ni pacon,  
forviŝu tuj ĉiun homan aĉon!  
Proksimiĝas la plej sankta festo,  
sur la korpo estas bela vesto,  
por terloĝantoj mankas miraklo.

Nunaj uloj jam nur monon ŝatas,  
dume oni anime malsatas.  
Donu por ni ne nur blankan panon,  
sendu al ni multe pli homamon,  
helpu ami la tutan homaron!

Ja, mi devus, tamen vin ne dankas,  
prefere vin refoje mi petas:  
Benu nin, Sinjoro de ĉielo!  
Kristnaske en ĉiu tera koro  
eknaskiĝu via bona filo!

Mi deziras, en la granda mondo  
ĉiutage post nun restu festo!  
Se sanĝiĝus nia homa eco...  
vivi tiel, ne nur je Kristnasko  
komencu naskiĝi Jesu' Kristo!

Plibonigu li malmildajn korojn,  
trovu en ni animajn trezorojn!

## Guozhu (Ĉinio)



Rimportreto de  
Li Qingzhao (1084-1155)

Li Qingzhao, klera poetino  
sidante ĉe fenestr' vespere  
danĝerajn rimojn ŝi konkere  
serĉis kaj serĉis kun obstino.

Du aŭ tri drinkoj de la vino  
helpis al rememor' tenere.  
Li Qingzhao, klera poetino  
sidante ĉe fenestr' vespere.

Refutis sxi al servistino:  
Ĉu floras post pluveg' prospere?  
Ne! Nun la ruĝo magras tere  
nur verdo grasas ĝis kulmino.

Li Qingzhao, klera poetino.  
-- el *Guozhu* <Ĉina Galerio> p.86

## Ĉineske

### Li Qingzhao (1084-1155)

#### Serĉas en svag'

—laŭ ĉineska skemo Shengshengman\*  
Serĉas en svag'  
mi solece  
kun fridiga imag'.  
En ekvarmiĝa temp'  
oftas frost-hak'.  
Vinglutoj ne povas  
rezisti  
al vent-atak'.  
Grua flug'

ĉagrenas  
min pri korsenta pag'.

Ĉie floroj en stak'  
velkintaj,  
jam mankas florpluk-ag'.  
En izolo  
mi tranoktos en vak'.  
Pluv' platanon vipas  
vespere  
kun guta klak'.  
Jam nune  
trist' kulminas sen forvag'.

*Shengshengman* (lanta sontreni Ĝo): ĉina  
fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 10  
versoj respektive de 4,46,64,634,336 / 6,36, 46,  
634,37 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xa,xxa,xxa  
/ a,xa,xa,xxa,xa (x = senrima)

#### Nokt-pluvis en seri'

—laŭ ĉineska skemo Rumengling\*  
Nokt-pluvis en seri',  
restas post dorm' ebri'.  
Eĥis servistin':  
"Samas la begoni'."  
"Sen sci',  
sen sci'.  
Grasas verd' ol ruĝ' pli!"



\**Rumengling* (kvazaŭsonge): ĉina fikforma  
poemo el 7 versoj de 6,6,56,2,2,6 silaboj, laŭ  
rimaranĝo a,a,xa,a,a,a. La kvina kaj sesa  
versoj estas samaj.

#### En Buduar'

—laŭ ĉineska skemo Dianjiangchun\*  
en buduar'  
mi solecas kun ĉagren'  
kaj bedaŭr-ĝen'  
pri printempa sven'

ĉe balustrad'  
mi sopiras jen  
kien li?  
baras herb-scen'  
vojon de reven'

*\*Dianjiangchun (ruĝigitaj lipoj): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj respektive de 47,4,5 / 45,34,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,a,a / xa,xa,a (x=senrima)*

elĉinigis **Vejdo**

## Vejdo (Ĉinio)



### Sindonema veterano

okaze de la 88-a naskiĝtago de Li Sen\*

—laŭ ĉineska skemo Manjianghong\*\*

Kun verda glor'  
de esper'  
kara Li Sen  
jam staras  
en profundaĝ'.  
Kun granda pen'  
li fosas nian sulkon  
en esperanta ĝarden'  
silente  
sindoneme kaj  
kun elten'.

Prezentu  
ni kun ben'  
deziron  
de varmplen'  
al li sincere.  
Ĉe la solen'  
naskiĝtaga ni tostu  
por lia vivo sen ĝen'  
por verda  
la promesplena  
entrepren'!

*\*Li Sen: ĉina esperantista veterano, kiu sindoneme sin dediĉas al ĉina E-movado dum la tuta vivo. Li faris grandan kontribuon al*

*E-Movado de Interna Mongolio de Ĉinio.*

*\*\*Manjianghong (rivero plenruĝa): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po 11 versoj de 434,344,77,353 / 33,33,54,77,353 silaboj respektive, laŭ rimaranĝo xxa,xxa,xa,xxa / xa,xa,xa,xa,xxa (x = senrima)*

## Espero de infano

okaze de Infana Festo 2010

—laŭ ĉineska skemo Yulinling\*

povra infan'  
vagas strate  
ofte sen pan'  
li toleras batojn  
kaj insultojn  
de strat-tiran'  
gepatrojn li perdis  
jam en uragan'  
pereis  
ankaŭ lia  
karmemora la kaban'

esperon kun granda am'  
li nutras  
per larva fontan'  
li ne volas esti  
leĝera  
strat-huligan'  
li sopiras  
kore  
al hejmeca balzam'  
li volas  
krei domon  
per la propra man'

*\*Yulinling (tintado en pluvo): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun 11 kaj 12 versoj respektive de 4,44,644,65,347 / 7,35, 634, 426, 345 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xxa,xa,xxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x = senrima)*



## Cindy Mckee (Usono)



### Per malfermita okulo

—laŭ ĉineska skemo Guizhixiang\*

En ĉi horo  
guto da ŝvito  
post amoro.  
Muŝo proksimiĝas  
pro odoro.  
En taŭzitaĵ littukoj,  
lasita  
sola floro.  
Sen movado,  
sen pensado,  
sen sinjoro.

Sur fenestro, vaporo  
en disaj bildoj,  
en aŭroro.  
Tra fenestro, viro,  
poŝesploro.  
Ŝlosilo kaptas sunon  
kaj turnon  
de motoro.  
Muŝflugiloj  
vibras ritme  
kun sono.

\*Guizhixiang (aroma laŭbranĉo): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po 11 versoj de 4, 54, 64,734,444 / 7,54,64,734,444 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xa,xxa,xxa / a, xa, xa, xxa, xxa (x=senrima)

## Sola


—laŭ ĉineska skemo Yulinling\*

Tertremo for  
jam delonge.  
Longa esplor'  
kolektis infanojn  
al persisto  
de provizor'.

La sola certeco,  
deposta ignor'  
en tendoj  
jam sukure  
starigitaj en pulvor'.

Knabo fuĝis el pulvor'  
ĝis grundo  
ŝajnis el marmor'.  
Nokte li revenas,  
kolektas  
el urba kor'  
brikon, ŝtonon,  
panon!-  
jen, la plej granda or'.  
Scias li,  
ke sub urbo  
estas nur vapor'.

## Lily (Ĉinio)



### Jasmena bonodor'

—laŭ ĉineska skemo Guizhixiang\*

la bonodor'  
jasmena restas  
en mia kor'  
de kiam ŝi kaj mi  
ja en amor'  
diboĉis sub la arbo  
ŝi logis  
sen ajn pudor'  
min per arom'  
de parfumo  
al ĝua bor'

alkroĉiĝas al memor'  
ŝajne eterne  
feliĉa l' hor'  
ĉu en sufero aŭ  
kun bonhumor'  
mi ekflaras aromon  
ĉiam de  
jasmena flor'  
mi aspiras

al pasia  
geiĝa or'

## Viktoro (Ĉinio)

### Silentema knabino

—laŭ ĉineska skemo Renyueyuan\*  
staras vi sur alta mont'  
en sunluma bril'  
silentema  
enpensema  
kaj en trankvil'

kvazaŭ lotus'  
treme skuas  
en ventfacil'  
kvazaŭ fluas  
roj' sensone  
sur ter-stabil'

\*Renyueyuan (rondiĝo de luno kaj homoj):  
ĉina fiksfirma poemo el du strofoj de 5 kaj 6  
versoj respektive de 75,444 / 444,444 silaboj,  
laŭ rimarangô xa,xxa / xxa,xxa (x=senrima)

## Cezar (Germanujo)

### Luno surbranĉa

—laŭ ĉineska skemo Renyueyuan\*  
Jen sur branĉo sidas Lun'  
laŭŝajne sen cel',  
ripozema  
kaj pozama,  
kun granda bel'.

Luno plena  
apud arbo,  
kun blanka hel'.  
Ni ĝin vidas  
kun plezuro  
en noktĉiel'.



## Sam (Ĉinio)

### Cementa vojo

—laŭ ĉineska skemo Yujiexing\*  
mi iras nudpiede  
sur la voj'  
obsede  
de cementa pavimo  
kamptero jam cede  
subpremiĝis  
de kreta blok'  
ĉie complete

ĉu oni planas prete  
okupi  
procede  
tutan vivtenan teron  
per cemento trete  
ĝis elĉerpig'  
de vivspaco  
jen surplanede

\*Yujiexing (promenado sur palaca strato):  
ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po ok  
versoj de 7,33,76,445 silaboj, laŭ rimarangô  
a,xa,xa,xxa (x= senrima)

## Mandio (Ĉinio)

### Pento

—laŭ ĉineska skemo Qingyu'an\*  
en mia viv' malplena  
forpasis  
ĉagrena  
tempo en fluo svena  
mi pentas pri  
nenifrad'  
kaj lud' senĝena  
  
sed mi sentas min splena  
jam nune  
alvena

memriproĉado ĉena  
 min vipadas  
 jen pro mia  
 faro azena

*\*Qingyu'an (verdjada taso): ĉina fikforma poemo el du strofoj kun po sep versoj de 7,33,7,445 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,a,xxa (x=senrima)*

## Sero (Ĉinio)

# Sub la ombrelo

—laŭ ĉineska skemo Yijianmei\*  
 en pluvo sub la ombrel’  
 ni kuniĝis  
 en spir-anhel’  
 kisas en varma brakum’  
 ni kveradis  
 per vort-miel’

bedaŭrinde la ĉiel’  
 ekserenis  
 iris sun’ el  
 nubaro kaj ni diris  
 adiaŭ al  
 ombrel-fabel’

*\*Yijianmei (branĉo de umefloro): ĉina fikforma poemo el du strofoj kun po 6 versoj de 7,44,744 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xxa (x = senrima)*

## Anna Maŝarova (Rusio)

# Pri Irena kaj hunda renkontiĝo

Kiam rizenŝnaŭcero\* Vitas ricevis titolon de Ĉampiono de Rusio, al li oni komencis direkti hundinojn el hundklubo por koncipo. Hundidoj rezultis kiel paĉjo – ili estis samaj ostecaj kaj trankvilaj. Tial Vitas havis grandegan popularecon de posedantoj de hundinoj. Ĉio estus bone, sed en hejmo ne

estis telefono. Ofte posedantoj de hundinoj ne povis komunikiĝi kun mastrino de Vitas kaj alveturis neatendinte kaj neĝustatempe. Tial Anna devis viziti hundklubon en ĉiu sabato por ekscii, kiam oni planas vican renkontiĝon por koncipo.

Sed en tiu fojo ŝi ne povis viziti klubon, ĉar semajno estis tre klopoda. Ĉe ŝi estis naskiĝtago, oni decidis festi en sabato, por ke gastoj povu sidi pli longe kaj ne rapide al hejmo. Kaj gastigantoj povus pli longe dormi en dimanĉo kaj ripozi antaŭ labortagoj post klopoda semajno.

En kulmino de gajeco soniĝis sono. Edzo mire levis brovojn – por malfruantaj gastoj estis jam malfrue, kaj ĉiuj gastoj jam kolektiĝis. Anna responde mire levis ŝultrojn, prenis de telero pecon de travidebla, kun sukcenkolora graso, salmo, metis ĝin en buŝon kaj iris al antaŭĉambro.

– Anna, mi iras kun vi, nemulte fumos,  
 – kuzino Irena pompe iris tuj post kaj komencis serĉi cigaredojn en poŝoj.

Vitas ekscite skuante felon sur spino brue flaris enŝovinte nazon en fendon inter pordo kaj fosto. Nerveze tremanta stumpo de vosto signalis pri tio, ke post pordo estas kvankam nekonata homo sed persono agrabla kaj ne danĝera.

– Vitas, iru lokon, – Anna rapide finmanĝante fiŝon ordigis harojn antaŭ spegulo.

Virhundo ĉagrene ekspiris, ankoraŭfoje flaris odoron de starinta post pordo gasto, kontente nazbruis kaj nevolonte iris al sia sternaĵo.

Naskiĝtagulino malfermis pordon. Sur sojlo agrabla viro staris konfuze ridetante. Lia aĝo estis proksimume tridek kvin jaroj.

– Saluton, Anna. Pardonu min, ke mi venis tiel malfrue.

– Bagatelo! Saluton! – gastigantino gasteme ridetis kaj peneme provis rememori, kiu estas li. Fine decidinte, ke li estas kolego



de edzo, ŝi faris paŝon reen invitante eniri.

Viro eniris al antaŭĉambro kaj konfuze haltis sur tapiŝo:

– Mi ĉi tie makulos al vi.

– Ne maltrankvilu, ni forviŝos, – Irena diris eligante ringeton de fumo kaj kun intereso pririgardante gaston. – Por ni tio estas kutima afero, sed ni volas scii pro kiu.

– Oj, pardonu min! – gasto komprenis aludon. – Mia nomo estas Dima.

– Kial vi staras en sojlo? – gastigantino helpis lin. – Vi eniru, eniru, ni atendas nur vin.

– Min? – en voĉo de gasto aŭdiĝis miro. – Por kio?

– Ha, “por kio”! – Irena indigne diris. – Certe por drinki! Nu kaj tiel plu. Dima, senvestiĝu!

Irena kokete movis grandan ŝultron, pro kio ĉemizeto malleviĝis pli malsupren, kaj sen tio granda dekoltaĵo pligrandiĝis.

– Por kio? – Dima brue ekglutis kaj penis ne rigardi dekoltaĵon. Liaj oreloj ruĝiĝis tiel, kvazaŭ oni surverŝis ilin per bolanta akvo.

– Nu kiel “por kio”? – Irena ridis. – Ĉu vi timas frostiĝi kun ni? Ĉi tie estas ne malvarme, en mantelo al vi estos varmege.

Anna riproĉe rigardis kuzinon:

– Irena, ne ĝenu la homon!

– Ĉu mi ĝenas? Ne! Simple ni ne devas stari en sojlo.

– Tio estas ĝuste, – gastigantino turnis sin al gasto. – Dima, eniru, demetu mantelon, ne demetu ŝuojn.

– Ĉu mi povas alkonduki mian knabinon? – gasto tumultis. – Ŝi estas malsupre, atendas en aŭto.

Post tiuj vortoj Dima kuregis malsupren laŭ ŝtuparo.

Irena seniluziige balancis buston, revenigis ĉemizeton al antaŭa loko:

– Nu, diablo prenu, ne estas feliĉo en vivo! Mi, stultulino, ekĝojis, pensis, ke la viro estas fraŭla. Sed li... – tuj makzelo de Irena

subenpendis, kaj Anna ne eksciis, kion pensas kuzino pri gasto.

Dima leviĝis laŭ ŝtuparo, kaj apud li iris eleganta juna rizenŝnaŭcerino.

– Ĉu tiu estas via knabino? – Irena rikaneme ridetis pro vorto “knabino”.

Dima kun amo karesis lanugan vizaĝon de rizenŝnaŭcerino:

– Nia Glaŝa, aha! Kandidatino al ĉampionoj! – en lia voĉo aŭdiĝis fiero.

– Por kio vi alkondukis vian kandidatinojn? – Irena ne kvietiĝis.

– Ĉu vi estas Anna? – Dima turnis sin al mastrino.

Ŝi jam komencis kompreni esencon de tiu okazo kaj pene detenante ridon kapoklinis.

– Al vi min direktis Luba por koncipi, – Dima pli multe ruĝiĝis, timis eĉ rigardi al flanko de Irena. Sed ŝi ekbalanciĝis per tuta korpo, faris strangan ŝmacan sonon kaj revenis al ĉambro. – Ĉu mi venis neĝustatempe? – Dima konfuze murmuris.

– Al mi? – Anna ne detenis sin de ŝerco.

Sed ŝia voĉo dronis en baso de Irena. Ŝi admire diris al gastoj:

– Al Anna viro venis, ili faros infanojn por vendo, – kaj ŝi daŭrigis post negranda paŭzo. – Li estas ĉarma!!

*\*Rizenŝnaŭcero – raso de grandaj hundoj, kiun oni kreis en Germanio.*



**esperantigis** Igorj Ĥomjakov (Rusujo)  
**ilustris** Tatjana Ĥomjakova (Rusujo)

## Guy de Maupassant (1850-1893)



# La konfeso

Margareta de Terel' estis mortonta. Kvankam ŝi aĝis nur kvindek ses jarojn, ŝi aspektis almenaŭ sepdek kvin jarojn. Ŝi anhelis, pli pala ol siaj littukoj, kaj estis skuata per teruraj tremoj, la vizaĝo konvulsita, la okuloj senrigardaj, kiel ŝi ĵus ekvidis hororan aĵon.

Ŝia unuenaskita fratino, Suzana, pli aĝa ses jarojn, surgenue plorĝemis. Sur alproksimigita tableto al la kuŝejo de la agoniantino estis, metitaj sur buŝtuko, du kandletoj kiuj brulkonsumiĝis, ĉar oni atendis la pastron kiu devis doni la ekstrempunkton kaj la lastan komunio.

La loĝejo aspektis sinistra kiel ĉiuj dormoĉambroj de la mortiĝantoj, kun tiu mieno de malespera adiaŭo. Flakonetoj trenis sur la mebloj, tolaĵoj trenis en la anguloj, forpuŝitaj per piedbato aŭ la balailo. Eĉ la malordaj seĝoj ŝajnis konsternitaj, kvazaŭ se ili estis ĉiudirekte kurintaj. La timinda morto estis tie, kaŝkaŭranta, atendante.

La historio de la du fratinoj estis kortuŝa. Malproksime oni citis ĝin; ĝi plorigis multe okulojn.

Antaŭe Suzana, la plejaĝa, estis amita freneze de fraŭlo kiun ŝi ankaŭ amis. Ili gefianĉiĝis, kaj oni plu atendis nur la decidita tago de la kontrakto, kiam Henriko de Sampier' mortis subite.

La malespero de la fraŭlino estis terura, kaj ŝi ĵuris neniam edziniĝi. Ŝi plenumis sian promeson. Kaj ŝi vestiĝis per vidvinaj vestaĵoj, kiujn ŝi ne plu forlasis.

Tiam ŝia fratino, ŝia eta fratino Margareta, kiu ankoraŭ aĝis nur dek du jarojn, alvenis, iun matenon, impetis sin enbrake de la unuenaskita, kaj diris al ŝi: « Fratinego, mi ne

volas ke vi estu malfeliĉa. Mi ne volas ke vi ploru dum via tuta vivado. Mi neniam forlasos vin, neniam, neniam! Mi ankaŭ ne, mi ne edziniĝos. Mi ĉiam restados apud vi, ĉiam, ĉiam ».

Suzana, kortuŝinta de tiu infana sindonemo, kisis ŝin kaj ne kredis pri tio.

Sed la etulino ankaŭ plenumis sian promeson, kaj malgraŭ la petoj de la gepatroj, malgraŭ la petegoj de la unuenaskita, ŝi neniam edziniĝis. Ŝi estis bela, tre bela; ŝi rifuzis multajn fraŭlojn kiuj ŝajnis ami ŝin ; ŝi ne plu forlasis sian fratino.

\* \* \*

Ili travivis ambaŭ ĉiutage de sia ekzitado, neniam ili separiĝis, eĉ unufoje. Ili iris en la vivon, flankon ĉe flanko, nedisigeble kunligitaj. Sed Margareta ŝajnis ĉiam malgaja, subfleksigita, pli morna ol la unuenaskita, kiel se eble ŝia sublimes rezigno estis rompinta ŝin. Ŝi maljuniĝis pli rapide, harblankiĝis ekde la aĝo de tridek jaroj, kaj ofte ŝi suferis, kiel ŝi estis trafita de nekonata malsano kiu turmentis ŝin.

Nun ŝi tuj mortos la unua.

Ŝi ne plu parolis jam de dudek kvar horoj. Ŝi nur diris, al la unuaj eklumetoj de la aŭroro:

– Iru serĉi sinjoron pastro, jen la momento.

Kaj poste ŝi restadis surdorse, skuata de spamoj, la lipoj tremantaj kiel se teruraj paroloj alvenis al ŝi el la koro, kaj ŝi ne povis eligi ilin, la rigardo frenezigata pro la teruro, timigege por vidi.

Ŝia fratino, korŝirata pro la doloro, frenezege ploris, la frunto surrande de la lito, kaj ripetis :

– Marganjo, mia povra Marganjo, mia etulino !

Ŝi ĉiam kromnomis ŝin: «mia etulino», same ke la duenaskito ĉiam nomis ŝin: «fratinego».

Oni aŭdis paŝojn en la ŝtuparo. La pordo malfermiĝis. Ĥorknabo ekaperis, sekvata de la maljuna pastro vestita per surpliso. Tuj post kiam ŝi ekvidis lin, la mortiĝantino eksaltante sidiĝis, malfermis la lipojn, balbutis du aŭ tri parolojn, kaj ekgratis siajn ungojn, kiel se ŝi volis trui ilin.

La pastro Simono alproksimiĝis, prenis al ŝi la manon, surfrunte kisis ŝin, kaj per milda voĉo :

– Dio pardonas vin, mia infano; estu kuraĝa, jen la momento alveninta, parolu.

Tiam, Margareta, frostotremante dekape ĝispiede, skuante sian tutan kuŝejon per siaj nervaj movoj, balbutis :

– Sidiĝu, fratinego, aŭskultu.

La pastro kliniĝis al Suzana, ĉiam senkuraĝa piede de la lito, restarigis ŝin, sidigis ŝin en brakseĝon, kaj ekprenante en ĉiu mano la manon de unu el la du fratinoj, li prononcis :

– Sankta Dio mia ! Sendu al ili la forton, jetu sur ilin vian mizerikordon.

Kaj Margareta ekparolis. La vortoj eligis el la gorĝo unu post la alia, raŭkaj, skanditaj, kiel ellacigitaj.

\* \* \*

– Pardonu, pardonu, fratinego, pardonu al mi ! Ho ! Se vi scius kiom mi timis tiun momenton, dum mia tuta vivado !...

Suzana plenlarne balbutis :

– Kion pardonu al vi, etulino? Vi ĉion donis al mi, ĉion oferis; vi estas anĝelo...

Sed Margareta interrompis ŝin:

– Silentu, silentu ! Lasu min diri... ne haltigu min... Estas terura... lasu min diri ĉion... ĝis la fino, ne movu... Aŭskultu... Ĉu vi memoras... ĉu vi memoras... Henriko...

Suzana ekstremis kaj rigardis sian fratinnon. La duenaskita reparolis :

– Endas ke vi aŭdu ĉion por kompreni. Mi aĝis dek du jarojn, nur dek du jarojn, vi ja memoras, ĉu ne? Kaj mi estis dorlotita, mi faris ĉion kion mi volis!... Ĉu vi ja memoras

kiom oni dorlotis min?... Aŭskultu... Kiam unuafoje li alvenis, li ŝuis vernisbotojn; li elrajdiĝis el sia ĉevalo antaŭ la perono, kaj li ekskuziĝis pro sia kostumo, sed li alportis novaĵon al paĉjo. Vi memoras pri tio, ĉu ne?... Nenion diru... Aŭskultu. Kiam mi vidis lin, mi estis tute skuita, tiom mi trovis lin bela, kaj mi restadis staranta en salonangulo dum la tuta tempo ke li parolis. La infanoj estas bizaraj... kaj teruraj... Ho ! Jes... Mi revis pri lin !

« Li revenis... plurfoje... mi rigardis lin per ĉiuj miaj okuloj, per ĉiu mia animo... mi estis granda malgraŭ mia aĝo... kaj multe pli ruza ol oni kredis. Li ofte revenis... Mi nur pensis pri li... Mi mallaŭte prononcis :

« – Henriko... Henriko de Sampier' !

« Poste oni diris ke li tuj edziĝos al vi. Kia aflikto por mi... Ho! fratinego... afliktego... kia afliktego ! Dum tri noktoj mi ne dormis, mi ploris. Ĉiutage, posttagmeze, post la tagmanĝo... vi memoras, ĉu ne ? Nenion diru... aŭskultu. Vi faris al li kukojn, kiujn li tre ŝategis... per faruno, butero kaj lakto... Ho! mi ja scias kiel... Mi farus ankoraŭ ilin se necesus. Li buŝplene glutis ilin, kaj li trinkis glason da vino... kaj li diris : « Estas bongusta. » Ĉu vi memoras kiel li diris tion ?

«Mi estis ĵaluza, ĵaluza!... La geedziĝotago alproksimiĝis. Restis nur du semajnoj. Mi freneziĝis. Mi diris al mi : li ne edziĝos al Suzana, ne, mi ne volas!... Kiam mi estos granda, li edziĝos kun mi. Neniam mi trovos viron kiun mi tiom amus... Sed iun vesperon, dek tagoj antaŭ via edziĝinofesto, vi promenis kun li antaŭ la kastelo, sub la lunhelo... kaj tie for... sub la abio, sub la granda abio... li kisis vin... kisis vin... vi en liaj du brakoj... tiel longtempe... Ĉu vi memoras, ĉu ne? Verŝajne estis unuafoje... jes... Vi estis tiel pala kiam vi reeniris la salonon !

« Mi vidis vin ambaŭ; mi estis tie, en la

masivo. Mi hunde rabiis ! Se vi povus, mi ambaŭ mortigus !

«Mi diris al mi: li ne edziĝos kun Suzana, neniam!» Li edziĝos kun neniŭ. Mi tro malfeliĉus... Kaj subite mi ekabomenis lin terure.

«Tiam, ĉu vi scias kion mi faris ?... aŭskultu. Mi jam vidis la ĝardeniston preparis buletojn por mortigi la vagajn hundojn. Li pistis botelon per ŝtono, kaj enmetis la pistitan vitron en viandobuleton.

«Mi ekprenis malgrandan apotekan botelon ĉe panjo, mi pistis ĝin per martelo, kaj mi kaŝis la vitron en mian poŝon. Estis brila pulvoro... La posta tago, kiam vi ĵus faris la kuketojn, mi fendis ilin per tranĉilo, kaj mi enmetis la vitron en ilin... Li manĝis tri kuketojn... mi ankaŭ manĝis unu... Mi ĵetis la ses aliajn en la lageton... post tri tagoj la du cigoj mortis... Ĉu vi memoras?... Ho! nenion diru... aŭskultu, aŭskultu... Nur mi ne mortis... sed mi ĉiam estis malsana... aŭskultu... Li mortis... vi ja scias... aŭskultu... tio estas nenio... Estas poste, pli malfrue... ĉiam... la plej terura... aŭskultu...

«Mia vivo, dum mia tuta vivado... kia turmento! Mi diris al mi: mi neniam forlasis mian fratinnon. Kaj mi diros al ŝi la tuton, ĵus en la momento kiam mi mortos... Jen. Kaj mi ĉiam pripensis al tiu momento, al tiu momento kiam mi diros al vi la tuton... Tiu momento estas alveninta... Estas terura... Ho!... fratinego!

«Mi ĉiam pensis, matene kaj vespere, tage, nokte: endas ke mi diru tion al ŝi, unufoje... Mi atendis... Kia torturo !... Tio estas farita... Nenion diru... Nun, mi timas... mi timas... Ho! Kiom mi timas! Se mi tuj revidos lin, post momento, kiam mi estos mortinta... Lin revidi... ĉu vi pripensas pri tio?... La unua! Mi ne aŭdacos... Necesas... Mi tuj mortos... Mi volas ke vi pardonu al mi. Mi volas tion... Se ne mi ne povus min prezenti antaŭ li. Ho ! Sinjoro pastro, diru al ŝi

ke ŝi pardonu al mi, diru... mi vin petegas. Se ne mi povus morti...

\* \* \*

Ŝi silentis, kaj anheladis, ĉiam gratante la littukon per siaj ungoj kuntiritaj...

Suzana estis kaŝinta sian vizaĝon en siaj manoj, kaj ŝi ne movis. Ŝi pensis pri li, kiun ŝi povus ami tiel longtempe! Kia bona ekzistado ili travivus! Ŝi revidis lin, en la malaperinta estinteco, en la malnova paseo por ĉiam estingiĝinta. Karaj mortintoj! Kiom ili korŝiras vin! Ho! Tiu kiso, lia nura kiso! Ŝi enanime konservis ĝin. Kaj poste nenio plue, nenio plue dum ŝia tuta ekzistado!...

Subite, la pastro restariĝis kaj, per laŭta kaj vibranta voĉo, li kriis :

Fraŭlino Suzana, via fratino baldaŭ mortos !

Tiam Suzana, malfermante siajn manojn, montris ŝian vizaĝon plena da larmoj, kaj sin pelante al sia fratino, kisis ŝin per sia tuta forto, balbutante :

– Mi vin pardonas, mi vin pardonas, etulino...



**Noël Lecomte** tradukis  
(Francujo)



Eldonas Redakcio de *Penseo*  
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)  
Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo  
de No. 19, Wujiang St., Jiangbei Distrikto,  
Chongqing, 400020, Ĉinio  
Tel: (023) 67095890 (hejme)  
Retadreso: vejdo@163.com

Ĉiujn kontribuojn al la ĉefredaktoro.

Por legi pasintajn numerojn de Penseo, vin turnu al [www.elperno.cn/penlisto.htm](http://www.elperno.cn/penlisto.htm) aŭ

<http://gazetejo.org/eo/penseo>

